
# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1980 · 1 · (77)

SLOVNAFT

EXPORTNÝ PROGRAM

BRALEN ALTPREMA POLIETILENO ●
TATREN POLIPROPILENO ● 1,2-ETANDIOLO ●
2,2-OKSIDIETANOLO ● OKSIRANO (=ETILENOKSIDO) ●
ETILBENZENO ● ARSOL AROMATA SOLVENZO ●
BENZENO ● METILBENZENO ● 1,4-DIMETILBENZENO
● 1,2-DIMETILBENZENO ● FURALA EKSTRAKTAĴO ●
SKVAMOFORMA DUNATRIA SULFIDO ● $C_5$-FRAKCIO

SLOVNAFT
NÁRODNÝ PODNIK, BRATISLAVA

# NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj depost 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj akiritaj per Esperanto penetris en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika internacia lingva komunikilo.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn, kaj malfavorante aliajn?

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de Esperanto. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la senscion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas senscio, kaj prudentaj duboj forigeblaj per pravaj argumentoj.

Ĉu, do, la jardeko de la 1980aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la jardeko, en kiu oni fine konsciiĝos pri la maljusteco kaj la nenecesaj kostoj de la nuna internacia reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La InternaciaLingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En decembro 1979 kompletiĝas 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de Unesko: la fama rezolucio subtena al Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954. Tiu dat-

reveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kaj Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en Novjorko de nova oficejo de UEA kies specifa celo estas fortigi la rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de Ekosok vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de neregistaraj organizaĵoj ĉe Unesko.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli finance kaj morale stabila ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni rededicu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.

Humphrey Tonkin
Zamenhof-Tago 1979

---

Hanojo, la 24-an de novembro 1979

Al Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
k-doj Jaromír Jermář, prez. kaj Zdenko Křimský, sekr.
en Praha

Estimataj kamaradoj, geamikoj de ĈEA,

hodiaŭ kun granda plezuro ni informas vin pri la helpo de ĈEA al unu vjetnama lernejo.

Via aktuala helpo al vjetnamaj infanoj estas tre grava kaj signifoplena, ĉar ĉiu internacia subteno kaj helpo estas necesaj por ni. La helpo de ĈEA al vjetnamaj infanoj havas jam sian tradicion. Via nuna helpo al vjetnamaj infanoj tamen estas novtipa kaj ekzempla, ĉar ĈEA transprenas konstantan patronecon je unu vjetnama lernejo. Honorigan akcepton de via helpo ni rezervas al Baza ĝenerala lernejo NGÔ SI LIÊN en Hanojo, str. Ham Long, n-ro 29.


Solena transdono de viaj donacoj okazis la 20-an de nov. 1979 dum ĉeesto de k-doj NGUYÊN VAN KINH, prez. de VPEA, TRÂN HOAI NAM, ĝenerala sekretario de Vjetnama komitato por solidareco kaj amikeco kun aliaj popoloj, de la reprezentantoj de vjetnamaj Kleriga ministerio, ministerio pri Eksterlandaj aferoj, komitato por kulturaj interrilatoj kun eksterlandoj, de vjetnama gazetaro kaj informagentejo kune kun geinstruistoj kaj lernantoj de lernejo NGÔ SI LIÊN. La transdonon ĉeestis ankaŭ kultura ataŝeo de Ĉeĥoslovaka ambasadorejo en Hanojo k-do Miloš Hoffmann.





1. k-do Miloŝ Hoffmann, kultura ataŝeo de ĈSSR - Ambasadejo transdonas donacojn de ĈEA al lernejestrino HOANG MINH CHÂU

2. Sur korto de lernejo NGÔ SI LIÊN



Ĉiuj grupiĝis en la korto de la lernejo /proks.500 personoj/ kaj je la 9-a horo ĉe alveno de k-do Hoffmann ĉiuj bonvenigis lin, ĉefe la gelernantoj per floroj.

Dum la solena transdono frunte estis la ŝtataj flagoj vjetnama kaj ĉeĥoslovaka, la busto de prezidento HO CHI MINH, ambaŭflanke sloganoj vjetnamaj kaj en Esperanto:

VIVU LA VJETNAMA - ĈEĤOSLOVAKA AMIKECO !

BONVENON AL LA HELPO DE ĈEA POR VJETNAMAJ INFANOJ!

K-do NGUYEN VAN KINH, prez.de VPEA pritaksis la aktivecojn de ĈEA kaj ĝian daŭran subtenon kaj helpon al la vjetnama popolo, al VPEA kaj la seninterrompajn kaj firmajn rilatojn inter VPEA kaj ĈEA. Kaj pri la nuna helpo de ĈEA al vjetnamaj infanoj li diris: "La nova simbolo de amikeco inter la vjetnama kaj ĉeĥoslovaka popoloj estas ja nobla kaj belega, ĉiam plifirmigita de ambaŭ popoloj pere de ambaŭ esp.organizaĵoj VPEA kaj ĈEA..." Nome de vjetnama esperantistaro kaj de infanoj li esprimis sincerajn dankojn al la KPĈ, registaro kaj popolo, same al la esperantistaro de ĈSSR, kiu rezervas ĉiam por vjetnama popolo valoran kaj efikan helpon.

K-do Miloš Hoffmann en sia parolado pritaksis la heroecon de vjetnama popolo en ĝia batalo kontraŭ agresantoj kaj same la laboron por socialisma rekonstruo de la ŝtato. En la nomo de ĉeĥoslovaka esperantistaro li transdonis la donacon al la direktorino Minh Chau, kiu kortuŝita transprenis la donacon kaj esprimis korprofundan dankon pere de k-do M.Hoffmann al ĉeĥoslovakaj popolo kaj esperantistaro.

La estraro de lernejo Ngô Si Liên promesas organizi kursojn de Esperanto por instruistoj kaj lernantaro respondante tiel la deziron de ĈEA en la espero, ke la rilatoj inter ĈEA-VPEA -NGÔ SI LIÊN lernejo kreskos kaj plifirmiĝos.

Por VPEA: DANG DINH DAM

# NE NUR NIA ASOCIO...

Ni sen komento represas iom mallongigite la artikolon el NIA VERDA INFORMILO /n-ro 9, julio-oktobro 1979/, kiun eldonas Helena Esperanto-Asocio, ĉar ĝia enhavo esprimas ankaŭ nian opinion. Ni pardonpetas Helenan Esp-o - Asocion, ke de tiu ĉi momento ĝi paradas en Horizonto kaj Perspektivo kiel "kaŝita komunisma organizaĵo".

La pasintan monaton okazis en Ateno "Internacia konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado". Temis pri modesta kunveno de kelkaj esperantistoj, membroj de la Movado fondita de prof. D-ro Ivo Lapenna post la hamburga Universala kongreso de Esperanto en 1974, kiam elektiĝis kiel nova prezidanto de UEA D-ro Humphrey Tonkin.

Ĉefa motivo por la fondo de tiu Movado estis laŭ ĝiaj fondintoj "bedaŭraj eventoj" okazintaj dum kaj antaŭ la elektokunsido de la komitato en Hamburgo kaj la certeco, ke ekde tiam UEA ĉesis esti neŭtrala. Ekde sia fondo la Neŭtrala Esperanto - Movado senĉese kaj kruele atakas UEA tiel, ke oni povas legi en NEM-bultenoj neatenditajn misaĵojn adresitajn al la estraro de UEA. Maldecaj karakterizaĵoj kiel "puĉistoj", "rabistoj", "klikoj" k.a. ofte aperas tiel, ke oni malfacile distingas kaj tute ne akceptas, ke tia bedaŭra afero, tia malamika atmosfero povas koncerni nian unike amikecan rondon.

Oni eble devus tute ne okupi sin pri tia afero, se ne enmiksiĝus la gravega nomo de prof.Ivo Lapenna, eminenta kaj respektinda figuro en la tutmonda Esperanto-movado. Estas vaste konata la ĝisnuna ofero, la valoro kaj la neelĉerpebla Esperanto - sperto de prof.Lapenna, kiu kiel prezidanto de UEA sukcese gvidis la movadon dum multaj jaroj. Estas tute nekomprenebla la enmiksiĝo de tia nomo en klopodo preskaŭ celanta la humiligon kaj la disigon de la Esperanto-fortoj.

Ni interesiĝas pri la afero tial, ĉar la Atena konferenco donis al ni la okazon priparoli la aferon kun malnova kaj elstara samideano, partoprenînto de la menciita Konferenco. Ni interesiĝis pri ekscio kio ekzakte okazis en Hamburgo, nome kion kaj kiamaniere oni rabis, puĉis.- Ni insiste klopodis informiĝi pri la fatala voĉdonado kaŭzinta tian neatenditan krizon.

Post longa bonintenca interparolo kun la bona samideano ni nur estis informitaj pri tio, ke la tuta hamburga "bedaŭra" evento estis la elekto de D-ro Tonkin kiel prezidanto de UEA, farita tamen en laŭstatuta kaj justa voĉdonado de la Komitato. Nia amiko longe parolis pri la brila personeco de prof.Lapenna, kiu liaopinie kredeble devis resti eterna prezidanto de UEA. Li sekve klopodis ekspliki la konatan refrenon de NEM pri la neŭtraleco de UEA, kiun la posthamburga gvidantaro de la Asocio minacas precipe per la nova statuto, kies pritraktita projekto estis jam proponita al la membraro de la Asocio. La akuzo estas grava. Ni tamen kompreneble interesiĝis funde esplori la aferon, sed ni simple konkludis, ke minaco kontraŭ la neŭtraleco de UEA ekzistas nur en la fantazio de la NEManoj. Kaj jen kial: oni unue devus scii, ke estis la nederlanda legaro pri asocioj, kiu postulis ian teknikan modifon de la priparolata UEA-statuto. La Estraro de UEA kaptis nur la okazon modernigi la malnovan statuton de la Asocio, tamen laŭ nefundamentaj eroj.

La nova statuto ekde decembro 1978 estis deklarita kaj publike prezentita al la membraro de UEA. Ĉiu esperantisto havis la rajton kaj eblecon partopreni la statutan diskuton, pritrakti la tutan projekton kaj sciigi al la Centra Oficejo de UEA siajn eventualajn reagojn. Tiel, post tia kolektiva pritraktado la proponita statutprojekto, vaste jam modifita estis enkondukita en la Komitaton dum la lucerna UK. La 141 komitatanoj longe kaj detale tralaboris kaj fine preskaŭ unuanime akceptis la tutan novan statuton. Restas nur la Ĝenerala voĉdonado de la aliĝintaj landaj Asocioj kaj ceteraj membroj de UEA por ke la nova statuto estu laŭorde valida. Tiu estis la vojo de la nova - suspekta laŭ NEM - statuto de UEA.

Ni ne konas pli demokratian manieron, kiun oni vere povus

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR

Eksportas MERKURIA Praha


proponi pri la afero. Ĉu tiu nova statuto vere minacas la neŭtralecon de la Asocio? Per kia mistera maniero la "puĉistoj" intencas per la nova statuto forigi la neŭtralecon? Kiuj estas tiuj barbaroj de la "Tonkina Kliko"? Ĉu la tuta estraro, la tuta komitato kaj ankaŭ preskaŭ la tuta membraro de UEA? La temo estus vere ridinda se nia vizitanto ne estus persono severa, bona kaj respektinda esperantisto. Li tamen klopodis nin konvinki pri siaj opinioj miksante siajn naivajn argumentojn kun senfinaj laŭdoj pri prof.Lapenna. Lia obstina nostalgio pri la pasinteco ne permesis al li vidi,ke malgraŭ la senduba valoro de prof.Lapenna, la nova sento,kiun inspiris D-ro Tonkin kaj la posthamburga gvidantaro de UEA plimodernigis la Asocion kaj gvidis la movadon al laŭdindaj sukcesoj. Financaj rezultoj kaj impresegaj faktoj pruvas la vivecon de la Asocio, evidente gvidata de kapablaj homoj.

Ni ne laŭdegos personojn. Ni kredas, ke en nia afero ĉiaj "dioj"-Esperantismo kaj UEA estas ni mem kaj neniu rajtas transformi nian movadon en Lapenismon aŭ alian ismon. Ĉar, malgraŭ kies ajn aparta persona kapableco la konservado kaj progresigo de niaj celoj estas finfine la rezulto de la paca kaj amikeca laborado de la granda nekonata amaso de la Esperantistoj en la tuta mondo.

Tiu ĉi silenta amaso respektas kaj admiras la brolajn figurojn, kiuj tamen devas esti modeloj de la esperantista amo kaj amikeco. Ĉiu eminentulo direktu sian energion kaj apartan talenton al kampoj de vera kunlaboro kaj estu certa, ke la esperantistoj kapablas mem protekti la neŭtralecon kaj ĉian virton konsistigantan la noblan Esperanto-idealon.

## JUNULARO DE ĈEA en 1979 kaj 1980

Post la pasinta jaro oni kutimas rerigardi kaj kontroli sian laboron. La junulara komisiono povas tion fari kun trankvilo. Sufiĉas trafoliumi la nove fonditan kronikon kaj ĉiu tuj vidas, ke la jaro 1979 estis efektive riĉa kaj fruktodona. Ni rememoru la plej gravajn aferojn, kiuj koncernis la ĉeĥan Esperanto-junularon.

Kiam ĉe la III-a kongreso de ĈEA en februaro 1979 estis aliorganizita la sepmembra junulara komisiono kaj ekfruntis ĝin Olga Sittauerová kiel prezidantino kaj D-ro Vladimír Škoda kiel sekretario, la komisiono eklaboris kun novaj fortoj kaj kiel rezulto aperis nova agadplano. La plano enhavis sepetapan ciklon da seminarioj, kunlaboron kun SAJ/Socialisma Asocio de Junularo/, aranĝon de junulara etapo de S E T Lančov, daŭrigon de la Esperanto-olimpiado kaj kolektadon de informoj pri interkluboj /kunlabore kun la pedagogia sekcio/, fari adresaron de junaj membroj de ĈEA kaj regule kontribui al gazetoj Starto kaj Progreso. Ni povas diri, ke ĉiuj taskoj estis plenumitaj, kvankam nia reprezentanto ne sukcesis partopreni la 35-an kongreson de TEJO en Nederlando.

La plej gravaj junularaj aranĝoj de la pasinta jaro estis seminarioj, printempa en Opava kaj aŭtuna en Merklín /Karlovy Vary/. Alia aranĝo estis la junulara etapo de S E T en Lančov.

Nian alvokon /4-a n-ro de STARTO/ respondis 9 interkluboj kun 123 membroj, el kiuj 111 estas infanoj ĝis 16-jaraj. Se oni alkalkulos 124 infanojn instruitajn en Lančov, la asocio havas bonajn rezultojn pri la instruado de Esperanto al infanoj. Sed la rezultoj povus esti pli bonaj, se aŭdiĝus ĉiuj rondetoj. En STARTO 3/79 ni lanĉis la duan jarkuron de Esperanto - olimpiado, kiun partoprenis 11 konkursantoj.

Preskaŭ regule ni informis pri la junularo esperantlingve en STARTO kaj ĉeĥlingve /pli detale/ en Progreso, kiun eldonas EK en České Budějovice.

En la jaro 1980 atendas nin novaj seminarioj. Ni startos II-an ciklon da seminarioj por pluaj interesitoj. La printempa okazos la 14-16-an de marto en Valtice. Por ceteraj gejunuloj ni preparas ankaŭ denovan junularan etapon de S E T Lančov/la unua etapo/ kaj ni partoprenos ankaŭ la Pacmarŝon 19-4. 1980 /aranĝanto LG Jablonec/. El internaciaj aranĝoj meritas atenton la 36-a kongreso de TEJO, kiu okazos 25.7.-1.8. 1980 en Rauma /Finnlando/.

Kompreneble ankaŭ aperos la 3-a etapo de Esperanto-olimpiado kaj ni kalkulas ankaŭ kun laboro de junularo en lokaj grupoj aŭ kolektiva aŭ individua. Informu nin pri via agado. Vi povas gvidi infanojn en pionirdomoj, aranĝi programon, ekskurson aŭ bibliotekon de via klubo, helpi labore en Lančov aŭ simple plibonigi vian lingvoscion. Ni proponas al vi ankaŭ asocian ekzamenon kaj postan helpon kiel instruistoj.

La jaro 1980 estu por nia aktivado plensukcesa.

M.Malovec

---

## SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO
## INTERNACIA SEMINARIO EN BAD SAAROW/GDR

Kutime precipe interesas la lingvistikaj aspektoj de la internacikomunikada demando de la planlingvo Esperanto. Pri tio kaj lastatempe ankaŭ pri politikaj, ekonomiaj, juraj kaj aliaj aspektoj de la lingva problemo pli kaj pli ofte aperadas studoj, estas organizataj kolokvoj kaj seminarioj, debatas universalaj kaj junularaj kongresoj.

Nur tre malofte, tamen, oni donas atenton al la esperantista lingva komunumo, al tiu kolektivo, kiu tenas kaj pluevoluigas tra jam preskaŭ 10 jardekoj la internacian lingvon.

Ĉu la gvidantoj de la internacia Esperanto-movado, de la landaj kaj fakaj asocioj scias sufiĉe pri tiu objekto de ilia gvidado? Ĉu ili scias pri la karakterizaĵoj de la movado, pri ĝiaj ideaj kaj ideologiaj strukturoj, la sociologia konsisto de la parolantaro, pri la motivoj de la membroj siatempe aliĝi al Esperanto kaj sin engaĝi por ĝi ktp.,ktp.? Certe, intuicie oni scias, supozas, sed tro malmulte.

Evidenta pli kaj pli iĝas la kontraŭdiro inter la altaj pretendoj de la Esperanto-movado oferti solvon de la monda lingva problemo kaj la nivelo de la gvidado de la movado. Transformiĝo necesas, atingo de pli alta nivelo. Sed tio postulas pli da scio pri la movado, pri ĝiaj socipolitikaj aspektoj.

Jen la temo "Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" de internacia seminario, kiun organizis Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR de 18a ĝis 24a de novembro 79 en la gastodomo de la Prezidio de Kulturligo en Bad Saarow ĉe Berlin.

Post la tre sukcesa internacia seminario "Sciencaj aspektoj de Esperanto", okazinta de 17a - 23a de aprilo en Ahrenshoop GDR /libro kun la materialoj aperos komence de 1980/nun okazis dua, kun aparta konsidero de la karakterizaĵoj de la Esperanto-movado. Partoprenis ĝin elstaraj teoriistoj kaj gvidaj funkciuloj de la Esperanto-organizaĵoj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj krome gastoj el Italio, Japanio kaj Svedio. La 38 partoprenintoj, ĉiuj gastoj de CLE, aŭskultis 25 prelegojn kaj pli ol 200 diskutkontribuojn.

La seminario nur povis tuŝi abundon da problemoj plutraktendaj. Cetere, tri profesiaj lingvistoj neesperantistaj kun atento kaj fortega interesiĝo observis la funkciantan Esperanton, uzatan de 10-landa ĉeestantaro por prelego, disputo, amika babilado k.a.

Certe la seminario vekos eĥon, stimulos similajn aktivecojn kaj konsciigos pri la graveco de la traktita temaro.


D-ro Detlev B l a n k e

---

## )Lingva angulo(

Diferenco inter prepozicioj"apud"/loko/kaj"ĉe"/loko rilate/

La danĝero por Esperanto estas, ke oni ĝin aplikas /tradukas/ laŭ naciaj lingvoj. Mi volas atentigi pri prepozicioj "apud" kaj "ĉe". Ekzemple:
Arbo staras apud la domo. /loko/
Jozefo sidas ĉe la tablo kaj manĝas. /rilato/
Antonio sidas apud la gepatroj kaj fotografisto ilin fotografas. /loko/
Antonio estas vizite ĉe la gepatroj. /rilato/
Li loĝas apud familio Novak. /en apuda ĉambro, domo ktp./
Li loĝas ĉe familio Novak /li estas subluanto de fam.Novak/.
Karolo estas ĉe si en la domo./pli ĝuste:Karolo estas hejme/.
Venu ĉe min!..."min"=direkto, ne akuzativo! Akuzativo estas kazo, kaj laŭ la Fundamento anstataŭ prepozicion oni povas u-




zi finan literon "-n". /Sed pli bone estas uzi: Vizitu min!/ Benešov apud Praha /pli bone Benešov ĉe Praha - ĝi rilatas al Praha kiel nomo/. Same Ústí ĉe Orlice.
Mi studas en universitato. Sed:Mi studas ĉe Oxford universitato.
Mi promenas apud universitato, atendante amikojn.
Sed: Ĉe la universitato mi havas amikojn.

Esperanto ja havas sian propran spiriton, pli logikan ol naciaj lingvoj. Ekzemple: "Nacia komitato" estas komitato, kiu defendas la rajton de la nacia malplimulto, loĝanta en iu granda nacio /ŝtato/. /Luzicanoj en Germanio kaj simile/. En propra nacio aspektas nelogike, ke "Nacia komitato"defendas propran nacion kontraŭ propra nacio. Laŭ ĝusta senco ĝi estas "Popola komitato", ĉar ĝi defendas popolon.

A.Slanina

## internacia panoramo

Dum la 38-a Studenta scienca konferenco de Samarkanda ŝtata universitato /Sovetunio/, unuan fojon en la kadro de la konferenco funkciis aparta sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ĝin partoprenis studentoj de diversaj fakultatoj de Samarkanda universitato kaj studentoj de Samarkanda medicina instituto. Entute estis traktataj 10 temoj kaj ĉiuj estis distingitaj per diversaj premioj: "Esperanto kompare al naciaj lingvoj" de S.Ĥamrakulov gajnis supergradan honorfolion; "Problemo de la internacia planlingvo en teorio kaj praktiko" de A.Joneŝev ricevis monpremion. Aliaj prelegoj "Planintenco kaj spontaneco en planlingvo" de J.Kocian;"Rolo de Esperanto en la batalo de laboristaro" de R. Jakubova; "Frazeologio de Esperanto" de S.Komalova; "Internacia lingvo Esperanto en medicino" de L.Jermanova; "Vasilij Jeroŝenko - poeto, esperantisto kaj socia aganto" de F.Ŝadibajeva; "J.A. Bokarev - la plej granda soveta sciencisto - interlingvisto" de C.Nuŝarova; "Baudouin de Courtenay kaj interlingvistiko" de J.Pavlova kaj "Redundanco en Esperanto" de S Klimenko ricevis diversgradajn honorfoliojn kaj libropremiojn. La prelegoj estas presitaj en la programo de la konferenco, kiun eldonis Samarkanda ŝtata universitato.

/Laŭ VOĈO, Jugoslavio/

UNUA TUT-AMERIKA ESPERANTO - KONGRESO

Unua Tut-Amerika Esperanto-kongreso okazos inter la 12-a ĝis la 15-a de julio 1980 en argentina urbo San Luis. La organizantoj entreprenis la starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento en la tuta mondo, kaj konsekvence la ampleksan disvastigon de Esperanto. Tial esperantistoj el la tuta mondo sendu salutojn por la

kongreso, librojn, revuojn, bultenojn k.a. esperantaĵojn al: I-a Tut-Amerika Esperanto-kongreso, Casilla Correo Central 289, 2000 - Rosario, Argentino

Kun ĝojo ni informas, ke ni ricevis unuan ekzempleron de oficiala organo de KEA, kiu simple nomiĝas KUBA Bulteno. Ĝi estas multobligita, parte nacilingve skribita. Adreso: KUBA ESPERANTO - ASOCIO, Poŝtkesto 314, H A V A N A 1

ESPERANTISTA EDZIĜO

Estas por ni speciale agrable informi, ke Floreal Gabaldá, honora membro de TEJO, tre agema kaj meritplena esperantisto decidis salti el la fraŭla al la hejmeca vivo kaj kiel decas por ĉiu bona esperantisto, kune kun samidea virino. La feliĉa novedzino estas ĉarma ĉeĥino Líba Košlová. ĈEA sincere gratulas al Floreal kaj al Líba kaj en venezuela novhejmo deziras plenan kontentecon. La gratulon publikigis kun bela foto ankaŭ novembra n-ro de Venezuela Stelo, organo de VEA.

BULGARIO. Al la sepdekjariĝo kaj eminentiĝo de N. Aleksiev, hon.prezidanto de MEM, per ordeno de Heroo de Socialisma Laboro gratulis kamarado Todor Ĵivkov.

Bulgara Esperantisto, organo de Bulgara Esperanto - Asocio, aperados ekde la nova jaro en duobla amplekso. Mendebla ankaŭ ĉe PNS.

UNESKO. En kategorion C de UNESKO kiel organizo estis akceptita Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

JUGOSLAVIO. Internacia Pupteatra Festivalo en Zagrebo dum la tagoj 4. - 7.10.1979, ricevinta malavaran subtenon materian kaj moralan flanke de aŭtoritatoj kaj de la publiko, brile sukcesis. La festivalon partoprenis kvin ŝtataj pupteatraj ensembloj /rumana, jugoslava, pola, kataluna kaj franca/ kaj la prezentadoj havis altan nivelon.
La okan renkontiĝon de lernantoj-esperantistoj partoprenis 53 infanoj el Italio, Norvegio, Hungario kaj Jugoslavio.

En Jugoslavio ekzistas 81 Esperanto-kluboj.

TRAFIKO. Ŝtataj fervojoj de ses ŝtatoj /Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Hungario, Italio kaj Pollando eldonas siajn horarojn kun esperantlingvaj klarigoj kaj detalaj informoj.

ANGLIO. Brita parlamenta esperantista grupo nombras jam 89 membrojn. Ĝiaj celoj estas: enkonduko de ŝtataj ekzamenoj pri Esperanto, Esperanto-kursoj por instruistoj fare de ministerio de edukado kaj kurso de Esperanto en la programo de BBC.

UNUAN INTERNACIAN STUDENTAN ESPERANTO-KONFERENCON en LODZO en la tagoj 23a - 27a aprilo 1980, organizas Pola Studenta Esperanto-Komitato, PL 90-423 Łódź, str.Piotrkowska 77.



Jaroslav K l e m e n t :

# Simboliko kaj Esperanto

Sufiĉe longe en Esperanto-movado estas kritikata la formo de propagando per troa uzado de Esperanto - simboloj: verda koloro, verda standardo, verda stelo. La trouzado de verda koloro kaŭzas uniformitecon kaj malbuntecon de ĉiuj niaj propagandiloj: libroj, propagandaj kestoj, vitrinoj ktp. La trouzado de verdaj steloj kaj standardoj vekas nedezirindan impreson pri la "sekteco" de nia movado: jam Julio Baghy en sia fama poemo mokas esperantistojn, kiuj vaste uzante la verdajn simbolojn tamen ne scias bone la lingvon. Kiu efektive ŝatas Esperanton kaj bone konas modernajn ideojn de ĝia movado, ŝatas kaj estimas ankaŭ ĝiajn simbolojn - do, ne uzas ilin "en ĉiu angulo".

La "Regularo de Frostavallen" akceptita la 30-an de julio 1956 rekomendas plilarĝigi la informan kapablecon de nia Esperanto-propagando. La informado pri la Lingvo Internacia estu pli racia; la celo supozas tri ĉefajn direktojn de nia agado: 1/ la informadon de la publiko, 2/ instruadon kaj 3/ praktikan uzadon de Esperanto.

La metodoj estas diversaj: a/ artikoloj; b/ koncizaj objektivaj informoj regule sendataj al gazetoj; c/ organizata korespondado al la redakcioj /"leteroj de legantoj"/; d/prelegoj por publiko; e/ prelegoj por specialaj medioj /sciencaj institutoj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentoj kaj diversaj hobiaj organizaĵoj; f/ radioprelegoj kaj informoj; g/ afiŝoj; h/ flugfolioj; i/ sloganoj; j/ ekspozicioj; k/ filmoj; l/ akirado de membroj el diversaj civitanaj grupoj; m/ tradukoj nacilingven kun la rimarko "tradukita el Esperanto"; n/ la distribuado de la seslingva flugfolio de UEA en neesperantistaj kongresoj; o/ partopreno de esperantistoj-fakuloj en fakaj sciencaj aranĝoj kaj efektiva uzado de la lingvo; p/ la aliaj metodoj /unutema numero de la nacia presorgano aŭ suplementaj flugfolioj/. Nur intensa kaj komuna eluzado de ĉiuj ĉi metodoj estas bonrezulta. Pri la simboliko kaj ĝia modernigo la Regularo de Frostavallen rekomendas:

a/ Ne uzu por Esperanto la atributojn "artefarita", "helpa", "verda". La nocio "planlingvo" valoras sole en lingvo-fakoj.

b/ Ne emfazu superflue la aliajn projektojn de internaciaj lingvoj aŭ reformprojektojn de Esperanto.

c/ Ne diferencigu Esperanton kiel vivan lingvon kaj tiujn ĉi projektojn, se necesas paroli pri ili.

d/ Ne uzu en nacia lingvo la Esperanto-terminojn "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" ktp.

e/ Ne skribu pri Esperanto en nacia lingvo kun ortografiaj eraroj.

f/ Ne nomu la informadon "propagando".

g/ Kaj finfine ne ŝajnigu la Esperanto-movadon sekto /tro da steloj kaj flagoj, la kantado de Esperantaj kantoj en nekonvena medio,ornamo de vestaĵo per tro da Esperanto-simboloj.

Ĉiuj ĉi eraroj forlogas de Esperanto dekmilojn da homoj kaj kompromitas nian movadon. Emfazu ĉion, kio montras kulturajn kaj praktikajn valorojn de la lingvo. Estu forte konvinkitaj pri la ĝusteco de nia ideo kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ diversaj fantaziaĵoj. Estas necese porti la insignon - sed nur unu.

Tio estas ĉio, kio temas pri la e n h a v o de nia propagando. De la enhavo dependas ankaŭ la f o r m o de niaj propagandaĵoj /libroj, ekspozicioj, paneloj, vitrinoj, propagandaj kestoj, presaĵoj ktp./. En nelasta vico de la forma flanko staras ilia k o l o r a aspekto. Ne timu sobran buntecon - kaj forigu tro da "malvarma" verda koloro. Ja ekzemple niaj libroj ne estas pli malbonaj ol tiuj en nacia lingvo kaj meritas belan "vestaĵon"! Zorgu pri bona formo de niaj propagandiloj kaj ne laboru "eklezie", "sekteme".


S i m b o l i k o /laŭ PIV: "...scienco, kiu kolektas kaj povas klarigi la simbolojn de unu popolo, religio ktp.: la simboliko de katedraloj, de la blazono..."/ estas same aĝa kiel la tuta homaro. Ĉar la prahomoj /kaj ĝis nun kelkaj ne tute evoluintaj etnaj grupoj/ ne sciis klarigi diversajn naturajn fenomenojn /fulmon, pluvon, neĝon kaj ankaŭ diversajn naturajn katastrofojn/, atribuis ilian aperon al elpensitaj dioj. La homoj atribuis al siaj dioj supernaturan potencon. Eksteraj bildoj de dioj laŭ imagoj de la homoj estis fantazie elpensitaj totemoj kaj fetiĉoj - simple s i m b o l o j.

S i m b o l o /laŭ PIV: "1: Estaĵo aŭ objekto, ĝenerale rigardata kiel nature prezentanta aŭ elvokanta abstraktaĵon, ĉar ĝi posedas analogajn ecojn: la blanko estas simbolo de pureco, leono - de forto, kruco - de kristanismo..."/ - La enhavo de la nocio "simbolo" tial estas pli larĝa ol tiu de "emblemo". Laŭ PIV: "Simbolo havas pli antikvan originon kaj pli ĝeneralan akceptatecon, dum la emblemo estas ofte la rezulto de persona iniciativo..."

Por emblemoj estas karakteriza ilia pli evoluinta simpleco, abstrakteco - kaj nedivideble apartenas al ili la k o l o r o /fig. 1/. Ankaŭ al koloroj la homaro dum jarcentoj atribuis diversajn signifojn. Mi emfazas - diversajn - la diverseco estas tre grava por esplorata temo. Ekz. Ivanov tiel citas la kolorsignifojn laŭ la mezepoka heraldikisto Anselmo:



1. Koloroj heraldikaj



Oro /flavo/ signifas grandiozecon, forton, riĉecon, persistecon, majeston, kredon, justecon, bonfaradon,favoremon, fidelecon.

Arĝento /blanko/ signifas purecon, veron, senkulpecon, aristokratecon, sinceron /kaj ankaŭ akvon kaj e s p e r o n/.

Ruĝo signifas amon, kuraĝon, grandanimecon /fajron, sangon, varmon/.

Bluo signifas honoron, celkonsciencon, fidelecon, senkulpecon /ĉielon, aeron, sekan teron/.

Nigro signifas saĝecon, atentemon, persistecon, modestecon, klerecon /teron, malvarmon, nubon/.

Purpura ruĝo signifas potencon, malavarecon, piecon,pacemon, forton.

/Mi intence ellasis la verdon,ĉar tiun ĉi koloron ni pli poste esploros pli detale/.

Ni vidu, ke la "ecoj" penetras el unu koloro en la alian. Nenie alie mi legis pri tiuj ĉi signifoj. Kompreneble modernaj heraldikistoj - ĵus pro la multjara diverseco - evitas ilin. Nur Bartolomeo Paprocký de Hloholy, ĉeĥa heraldikisto kaj preskaŭ samtempulo de la ĉeĥa kronikisto Venceslao Hájek de Libočany, neekzakte klarigis ĉeĥajn aristokratajn blazonojn kaj iliajn kolorojn - laŭ sia propra fantazio /"Diadochos" 1602/. Liaj klarigoj aspektas kiel belaj fabeloj - bedaŭrinde sen iu historia pruvo.

La formo de la estimo rilate al simboloj estas parto de "morala kodekso" de ĉiu homo. Kompreneble ekzistas diferencoj: la plej ekstrema en Usono,kie "strioj kaj steloj" /fig. 2/ el nacia flago estas uzataj sur zonrimenoj, pantalon-teniloj - kaj ankaŭ mi vidis la kukojn bakitajn laŭ la nacia flago.Krom la normo leĝigita por usonaj flagoj uzataj de institucioj, ĝis nun ne ekzistas en Usono leĝo por sekurigo de la ŝtata aŭ nacia flago /!/ Nuntempa stato estas en Usono kritikata nur flanke de hobiaj kluboj - de Veksilologia /= = flagscienca/ Societo.La usona "vivmaniero" eksportaĵa post la II-a mondmilito en okcidentan Europon influis ankaŭ Grandan Briton, kie oni ekuzis la motivon de la nacia flago "Union Jack" /fig. 3/ vaste en komerca reklamo: ni povis vidi ĝin sur ĉapeloj, ĉemizoj - kaj ankaŭ sur la malsupra parto de "bikini"-bankostumo! Sed okcidenta Europo - iam lulilo de severaj heraldikaj reguloj - jam defendas siajn naciajn flagojn, blazonojn kaj ankaŭ iliajn partojn - emblemojn - per specialaj leĝoj: Granda Britio de la j. 1974 malpermesas uzi ilin en komerca reklamo, escepte ŝtatajn entreprenojn /ekz. ekspozicioj/. Ĉiuj leĝoj pri ŝtatblazono kaj ŝtatflago de Ĉeĥoslovakio /la lasta No. 142/1975/ malpermesas uzi ilin en komerca reklamo, en neŝtataj entreprenoj: la leĝo malpermesas uzi la ŝtatflagon /fig. 4/ sen rilato de ĝiaj largo kaj longo 2:3 kaj toleras nur standardon /fig. 5/ en rilato 1:3; por dekoraĵoj la leĝo permesas sole trikoloran rubandon /6/

/ estonte daŭrigota/



**PRODUKTO-PROGRAMO**
**Středočeské dřevařské závody,**
**závod BIOS,**
**Sedlčany**

BIOS

- muntitaj stalaj lignaj konstruaĵoj BIOS
- cerealaj deponejoj BIOS
- malpezaj mutitaj linokonstruaĵoj BIOS (amasloĝejoj, vestejoj, deponejoj k.s.)
- civitaj konstruaĵoj BIOS (vendejoj de nutraĵoj, de industriaj varoj, malsanulejaj pavilonoj ktp.)
- ventol-ekipaĵo BIOS por ĉiuj specoj de staloj

XII. INTERNACIA KEMIA FOIRO INCHEBA 80, BRATISLAVA, ĈSSR

Internacia kemia foiro INCHEBA estas oficiala foiro de ĈSSR registaro, kiu estas preparata sub aŭspico de Federala ministerio por eksterlanda komerco de ĈSSR.

Foiro estas fake preparita kaj aranĝita sur 36.000 $m^2$ kaj partoprenas ĝin ĉiam pli ol 600 entreprenoj el 25 landoj. Ankaŭ partoprenas ĉeĥoslovakaj organizoj kiuj eksportas kaj inportas kemikajn kaj farmaciajn produktojn, produktojn de kemikaj maŝinfabrikoj de regulacia kaj autmatizita teknikbezonoj por kemika industrio. Dum la foiro ricevos plej kvalitaj eksponatoj Oran medalon de INCHEBA 80.

NOMENKLATURO DE FOIRO:

- produktoj de fundamenta kemio
- farmacio kaj biokemio
- produktoj de por plastika kaj por kaŭĉuka industrio, produktoj en ligno, papero kaj de celuloza industrio, produktoj de keramika kaj porvitra industrio kaj aliaj.
- maŝinoj por kemia industrio kaj plua eliktita tekniko
- patentoj, licencioj, know-how, projektoj, teknika literaturo kaj simile

UNION DES FOIRES INTERNATIONALES

XII. MEDZINÁRODNÝ CHEMICKÝ VEĽTRH INCHEBA '80 BRATISLAVA, ČSSR

TERMÍN: 21.—27. 6. 1980


KIAL NE OBJEKTIVE? Iuj esp.revuoj /ekz.EĤO, n-ro 5 1979/ sporade ankoraŭ publikigas "verojn" de konataj aŭtoroj atakante nian asocion kaj UEA. Ni demandas nur kion la leganto pensas kaj komprenas sub "staĝa kondamno" aŭ ĉu la legantoj estas informitaj, ke s-ano V.Srna daŭre /ankaŭ por 1980/estas membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio?

PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA ĈS.FAKREVUO. Lingva ekspansiismo de la okcidentaj grandpotencoj nomiĝas studo de O.Kníchal en la novembra n-ro de "Cizí jazyky ve škole"/Fremdlingva instruado/. Ĝi traktas ofensivajn formojn de la penetrigo de la franca, angla kaj germana lingvoj en la politikaj kaj kulturaj agadoj de la okcidentaj potencoj sur diversaj teritorioj de la mondo kaj kontraste al la principo de la lingva egalrajteco. La studo skizas ankaŭ la hodiaŭan instruadon kaj disvastigitecon de la tn.mondlingvoj.

## KONKURSO DE MONDA TURISMO

Okaze de la 10-a jara jubileo la asocio "Monda Turismo" anoncas novan programon de la kampanjo "Esperanto en la Turismo" por plivastigi la uzadon de Esperanto sur la tereno de internacia turismo. La estraro de Monda Turismo alvokas ĉiujn esperantistojn partopreni la efektivigon de jenaj taskoj:

1. Ekinteresigi vojaĝoficejojn pri Esperanto
2. Konvinki ĉiceronojn kaj vojaĝgvidantojn en vojaĝoficejoj lerni Esperanton. Ankaŭ vi partoprenu kurson kaj fariĝu ĉicerono kaj vojaĝgvidanto
3. Informu nin pri hoteloj, kampadejoj, oficejoj, entreprenoj, restoracioj priservantaj turistojn, kiuj utiligas Esperanton
4. Instigi vojaĝoficejojn kaj eldonejojn eldoni prospektojn, gvidlibrojn kaj mapojn en Esperanto
5. Aranĝi ekspozicion aŭ aliforme prezenti atingojn de Internacia Esperanta Turismo
6. Informi kaj varbi por Esperanto-aranĝoj anoncitaj en la Turisma Esperanto-kalendaro
7. Partopreni internaciajn Esperanto-aranĝojn, renkontojn, feriojn k.s. kaj raporti al ni pri viaj impresoj. Se eble, ilustru viajn skribitajn impresojn per fotografaĵoj kaj diapozitivoj
8. Aperigi artikolojn pri la utiligo de Esperanto en turismo en nacilingvaj kaj Esperanto-revuoj
9. Proponi al organizantoj de internaciaj aranĝoj uzi Esperanton
10. Fariĝi membro kaj fakdelegito de UEA pri turismo
11. Aliĝi al Monda Turismo kaj varbi membrojn por ĝi
12. Trovi kaj proponi novajn eblecojn por disvastigo de la Esperanto-Turismo

Pluajn kondiĉojn de konkurso vi ricevos ĉe la prezidanto de turisma komisiono J.V.Otta aŭ rekte ĉe Elizabeta Pallos, Ybl.Miklos u.9. I ém.2, H - 7633 P E C S, Hungario

## PROMENO EN NIAJ TURISMAJ ARANĜOJ 1980 ◁

M a r t o

2-a renkontiĝo de Pacdefendantoj /kun kultura programo/ la 15-an de marto je la 9-a horo. Aranĝas KD ROH Dukla Pardubice. Aliĝojn akceptas Milada Hemerková, Wolkerova 2071, 530 02 P a r d u b i c e.

A p r i l o

8-a printempa paca marŝo en Jablonec n.Nisou. La 24-an aranĝas Esp.klubo LG de ĈEA, poŝtkesto 190, 466 21 Jablonec n.N.

J u n i o

3-a renkontiĝo de subercmontaraj esperantistoj /13.-15.6/ en M e r k l í n apud Karlovy Vary.
Aranĝas EK LG de ĈEA Karlovy Vary. Aliĝojn akceptas Jaroslav Klement, kpt.Nálepky 7 360 04 K a r l o v y V a r y.

Pacmarŝo Ležáky /22.6./ Pardubice Zámeček.
Vojoj por irantoj 35 aŭ 50 km; 60, 80 aŭ 120 km por biciklantoj. Aranĝas LG de ĈEA en Pardubice kunlabore kun ČSTV kaj OMR. Aliĝu ĉe Milada Hemerková, Wolkerova 2071, 530 02 P a r d u b i c e.

Dum s o m e r a sezono refreŝiga loĝebleco ĉe la valdigo Vranov nad Dyjí - prefere por eksterlandaj interesuloj :

loĝado: 4-litaj kabanoj /Kčs 72/ aŭ la loĝigejo sur la plaĝo en 3-lita ĉambro - unu lito Kčs 19,50

sur Ptačí vrch /Birda monteto/ 3- aŭ 4-litaj kabanoj /unu lito Kčs 27/

tranoktejo /trilitaj ĉambroj, unu lito Kčs 19,50/

hotelĉambroj: unulita Kčs 54, dulita Kčs 72, trilita Kčs 108

Informu vin ĉe:Rekrea entrepreno-rekreační podnik
671 03 V r a n o v nad Dyjí
aŭ Esp.klubo LG de ĈEA,poŝtkesto 72
674 01 T ř e b í č

J u l i o - A ŭ g u s t o

Populara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud la valbaraĵo Vranov nad Dyjí
I-a etapo 29.6. - 12.7. por la junularo
II-a etapo 13.7. - 26.7.
III-a etapo 27.7. - 9.8.

Aliĝojn: Esp.klubo LG de ĈEA poŝtkesto 72 674 01 TŘEBÍČ
Prezoj laŭ aliĝterminoj Kčs 750 - 850 por la junularo
Kčs 800 - 890 por plenkreskuloj.
La prezoj inkluzivas loĝigon en kabanoj kaj 5-fojan tagan manĝon. Loĝo en tendo malaltigas la prezon je Kčs 100



S e p t e m b r o

"Koro el marcipano" vokas vin partopreni la marŝon al Kunětická Hora, kiun aranĝas EK LG de ĈEA Pardubice. Aliĝojn ĝis 30.8. al M.Hemerková, Wolkerova 2071, 530 02 PARDUBICE.

T u t j a r a aranĝo

Ĉiun trian dimanĉon en urbo FRÝDEK - MÍSTEK, str.Palackého134 Národní dům - Nacia domo, oni aranĝas jam de jaroj "KAFEJON ESPERANTO". Temas pri konataj kunvenoj de esperantistoj dum la kaftrinkado kun sonbendaj kantoj en Esperanto, kun interparoloj pri literaturo, libroj kaj revuoj, kun interesaj prelegoj kaj raportaĵoj pri vojaĝoj de esperantistoj aŭ kun la daŭrigoj de la serio "Interesaj profesioj de esperantistoj". Depende de la partoprenantoj prelegoj estas en Esperanto aŭ en la ĉeĥa /slovaka/ eventuale kun traduko. La kafejo daŭras de la 9-a ĝis 17-a horo, prelegoj ek de la 13-a hoho 30 min.

Aranĝodatoj: 20.1., 17.2., 16.3., 20.4., 18.5., 21.9.,19.10., 16.11., 21.12.1980.

Informojn ĉe la aranĝanto : EK SKP Slezan, Palackého 134, 738 01 F r ý d e k - M í s t e k. Eblas mendi la tranokton.




POR LA INFANOJ
ESTAS BONA NUR TIO,
KIO ESTAS LA PLEJ BONA



STERILIZITA FRUKTA NUTRAĴO
KUN KAZEO, DESTINITA POR LA SUĈINFANOJ
EKDE LA KVINA MONATO DE LA AĜO, EN LA NOVA
KONVENA PAKUMO KUN LA DEPRENEBLA KORVILO,
FABRIKAS NACIA ENTREPRENO

JIHOČESKÁ FRUTA

IV-a ESPERANTISTA KULTURA F E S T I V A L O
honore al la 35-a datreveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio far Soveta Armeo

La Esperantista Rondeto de Uzina Klubo Ostroj Opava organizas sub aŭspicio de Ĉeĥa Esperanto - Asocio

LA IV-an ESPERANTISTAN KULTURAN FESTIVALON

La festivalo okazas en la tagoj

12. - 15. de septembro 1980

en la urbo Opava - enkadre de la XXII-a kultursemajno

" O p a v a d e B e z r u č "

ĈEFAJ ARANĜOJ DE LA IV-a ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO :

Fotokonkurso kun internacia partopreno. La konkursa temo: "La mondo de paco kaj amikeco ĉirkaŭ ni".
La limdato por konkursaĵoj: 30.5.1980. Pluajn informojn vidu en la konkursaj kondiĉoj.

Deklama kaj kantista konkurso kun internacia partopreno "La muziko kaj poezio"
Fakoj: 1.Poeziaĵoj 2. Kantoj kaj operarioj
Pluajn informojn vidu en la konkursaj kondiĉoj.

Arta vespero - Interkona vespero - Solena kunsido

Kunvenoj kaj renkontiĝoj de la sekcioj de Ĉeĥa Esper.-Asocio

Ekskurso en ĉirkaŭaĵon de la urbo Opava, vizito de memorindaĵo

LOĜIGA SERVO

La aranĝantoj de la IV-a EKF enloĝigos interesulojn,kiuj aliĝos antaŭ la 20-a de aŭgusto 1980.


PARTOPRENKOTIZO

Por ĉiuj aranĝoj escepte loĝigon....Kčs 55,-. Eksterlandanoj pagos laŭ apartaj kondiĉoj. Studentoj havos rabaton.

PLUAJN INFORMOJN KAJ ALIĜILOJN LIVERAS LA ORGANIZA KOMITATO:

ZK Ostroj - Esp. rondeto
Na rybníčku 41
746 01 OPAVA 1 - ČSSR





# Petrochema

PRODUKTAS

- hejtmaterialojn, lubrikajn, elektroizolajn, malalt-solidiĝantajn kaj konservajn oleojn,
- sintezajn surface-aktivajn materialojn,
- medicinajn kaj kosmetikajn blankajn oleojn,
- emulsiajn prilaborajn likvaĵojn kaj tranĉ-oleojn,
- industriajn help-rimedojn

Informoj de:
Obchodno - technická služba
PETROCHEMA, n.p.
DUBOVÁ
976 97 Nemecká nad Hronom

Telefón: Podbrezová 8321-3 Telex: 070273

XII. MEDZINÁRODNÝ CHEMICKÝ VEĽTRH INCHEBA '80 BRATISLAVA, ČSSR

TERMÍN: 21.—27. 6. 1980

Petrochema


# ni recenzas

Avoto : GUTARO. Eldonita de Esperanto Editions, Hastings, Anglio. 64 pĝ., 20 x 14 cm. Aĉetebla ĉe ČEA, Praha.

La poemkolekto, "muntita" /esprimo de la aŭtoro!/ far malnova kaj maljuna esperantisto Aleksandro William Thomson, enhavas pli ol tridek poemojn originalajn, du tradukitajn, 16 paĝan postskribon, foton kaj biografieton de la aŭtoro, kiu ankaŭ multe laboris en la organizado de la E-movado. Jam en Enciklopedio de E el j.1933-34 oni povas legi pri li.

La poemoj estas verkitaj laŭ klasikaj skemoj, kunzorge konservataj nombroj da poemaj kiedoj kaj rimoj, kiuj nur en kelkaj okazoj estas la viraj. Pri la ceteraj ecoj de la verko kaj pri arto ĝenerale parolu la aŭtoro mem:

"Mi ne arogas kredi, ke multaj centoj da esperantistoj tralegos tiujn ĉi versaĵojn... Do ne pedante mallaŭdu poezian verkon nur pro tio, ke ĝi ŝajnas al vi eksmoda, aŭ avangarda... Tro, tro ofte aperis en gazetoj falsaj poemoj, kies generintoj simple dishakis ian prozaĵon en neegalajn pecojn sen rimo, ritmo kaj pleje sen senco, kaj sintrompe nomis la rezultan halanĝon /PIV=ŝerca galimatio/ "poezio"... Nu, mi toleras la aserton de multaj "abstraktistoj", ke ili sincere serĉas novajn rimedojn por evoluigi la arton de poezio/resp. skulptado, muziko ktp./. Verŝajne ili raŭke deklaros, ke mi estas eksmoda pedanto kaj malamiko de progreso... Mi mem ne pretendas grandan poetan talenton... "

Ankaŭ oni trovas jenan eldiron: "Tamen mi opinias, ke ne poezie bonstila estas la indikativigo de participoj, kiel ĝi t r o v i t o s anstataŭ ĝi e s t a s /eraro - estos - rim. de la referanto/ t r o v i t a, ks." La subskribonto pensas, ke tiujn formojn oni povas toleri nur en klasikstile verkita poemo, kie la nombro da siloboj estas konservenda, sed en prozo /kaj speciale en faka verko/ ili ne havas lokon, ĉar ili malfaciligas ekkomprenon de la teksto.


La plua teksto de la postparolo interalie enhavas traktadon pri kelkaj specoj de sonetoj kaj pri "aleksandra" poezio. Kiu havas intereson pri la Avoto-forma poezio kaj kiu mem volas tiastile krei kaj ekscii ion pri la teorio de kreado, trovos en la libreto konvenajn instruon kaj ekzemplojn. De sur tiel gajnitaj scioj oni povas ascendi pli alten. En la naturo ne ekzistas nur Pamiro kaj Himalajo, sed ankaŭ malpli altaj montoj kaj montetoj. Kaj simile estas en ĉiu homa agado.

Fine la aŭtoro mencias la organizitecon de nia movado, en kiu mankas asocio de artistoj, kaj demandas: Kiu inaŭguros Internacian Artan Asocion?

Adolf Staňura

# Krucenigmo

Horizontale: A. Rektangula; el aloo farita; altamaso de grenpajlo /R/; ŝtofa ujo. - B. La unua parto de la moto.- C. Komenci malbone iri; kara persono /sen o/; rivero en Kanado; urbeto en Nrvegio; amegado /sen o/. - Ĉ. Fulgokolora /R/ ; spirmalsano /R/; hoteloj por motoristoj; havena digo /R/; en maniero de rano. - D. Sencela iranto; havanta ilustraĵojn; gramatika kazo por la voka formo en iuj lingvoj /R/. E. Prezentado en spirito pri io; estantaj en pli ol sufiĉa grado; sufikso por peco de io; difinita kvanteto de medikamento /sen o/;finna nomo de Finnio. - F. Paŝi en akvo /R/;artifiko /kun artikolo/; fari paston; skribа komuniko al alia persono; gento de granda mevo /R/. - G. Multekosta metalo /R/; la dua parto de la moto; nomo de la 16-a E-litero. Ĝ. Sidejo de helenaj dioj /R/; kemia elemento Tl /R/; rilatanta italan valuton; 12,5 % .



Vertikale: 1. La tri parto de la moto. - 2. Demando pri eco de oceano. - 3. Marherbo /R/; gento de marfiŝo /R/;romie 45. - 4. Markrustulo /R/; fari /R/; romie 52. - 5. Granda beletra rakonto; provizi per batariloj /R/. - 6. Ano de teismo /R/; manĝeblaj internaĵoj de besto /R/. - 7. Rilatanta la plej altan karton; nomo de la 24-a E-a litero; malnovĝermana litero /R/. 8. Mallongigo de "antaŭtagmeze"; blua printempa floreto /R/. - 9. Korinklino /artikolo kaj R/; devenanta el Laoso. - 10. Malmola korpoparto; sufikso por vegetaĵo donanta fruktojn; subtera ĉambro /R/. - 11. Havigi al si por mono /R/; ekspedi. - 12. Parto de maldika intesto /R/; tiri post si /R/. - 13. Malsupra parto de konstruaĵo /R/; ordo de mambestoj /sen o/. - 14. Nia planedo; sufikso por posteuloj ; movi sin de unu loko al alia. - 15. Membroj;ne kontraŭstari /R/. - 16. Mallongigo de kilovoltampero; kozaka hetmano partopreninta batalon ĉe Poltava 1709. - 17. Angulo formita per korpo de sidanta homo /R/; produkto de kokino /R/; rusa montra pronomo. - 18. Garantia subskribinto de kambio; prezentata kaj defendata aserto. - 19. Kolekto de farmaciaj formuloj /R/; grandega ŝtono /R/. 20. Ĉio kio impresas flarsenton /R/; simbolo de oro; lirika poemo. - 21. Difinita epoko, de kiam oni komencas kalkuladon de jaroj /R/; lina teksaĵo /R/; sufikso por frakcio. - 22. Vivanta estulo. - 23. La kvara parto de la moto.

Helpo: R = radiko de la vorto. - C. Elk; Roan. - E. Suomi. 17. Eti.

Sufiĉas ensendi la ĝustan tekston de la moto.
Limdato: 31 - 3 - 1980. Du solvintoj ricevos po unu libro.

Adolf Staňura

# RONDETA VIVO

BRNO. Okaze de la Internacia Jaro de Infano aranĝis la EK kun Klub školství a vědy literaturan kaj muzikan horeton sub titolo "Pacon al la infanoj en la tuta mondo." Enkondukon verkis red.I. Běhalová,unuopajn programerojn enkondukis kaj recitis prof. A.Růžičková-Pavlínová,kantis laŭreato de internaciaj konkursoj kaj solisto de Janáček-opero V.Halíř, H.Supová-Halířová,koncertkantistino , je fluto ludis A.Bourek kaj pianon ludis P.Kuchař.
La koncerto okazis la 27.11. 1979, brile sukcesis, entuziasmigis ĉiujn ĉeestintojn kaj okazis en plenplena salonego. Gravajn vortojn pri la signifo de la Internacia Jaro de Infano diris inaŭgure RND-ro J.Šikula.

En knaba internulejo de Sudmoravia Viand-Industrio instruas Esperanton Inĝ.V.Doubek,kiu tie samtempe gvidas Esperanto-rondeton. Vk

CHEB. Dum la vespero pri Chopin en novembro pianludis M. Kořánová kaj recitis E.See - mannová kaj poeto Karen. Reĝisoris antaŭ multnombraj aŭskultantoj Valda Vinař. En decembro okazis Memorvespero pri L.L.Zamenhof.La klubanoj preparis rakonton el la junaĝo de Zamenhof kaj oni recitis la poemon "Mia penso". Kun granda atento aŭskultis ĉiuj la prelegon de G.Piron. La enketon pri Zamenhof respondis 13 klubanoj,el kiuj 3 estis premiitaj. VJ

FRÝDEK-MÍSTEK. En kafejo ESPERANTO okazis la 16.12.1979 parolado de s-ano Inĝ. Jiří Pastor pri: Vagadoj tra la bulgara enlando, kun koloraj diapozitivoj.

KOLÍN. E-rondeto rememorigis marde la 18.12.1979 la 120an jartagon de la naskiĝo de L. L.Zamenhof per prelego kaj per ludo de diskoj kun operarioj kaj kantoj en Esp.- de la bulgara solisto Veselin Damjanov kaj Miŝo Zdravev.
J-VT

KARLOVY VARY. En la mondfama fabriko "Karlovarský porcelán" komenciĝis kurso de Esperanto por 21 metilernantinoj kaj 4 iliaj edukistinoj. La fabriko eksportas altkvalitan porcelanon al 50 landoj - kaj ni esperas,ke ĝia bona laboro estos ankaŭ baldaŭ propagandata en Internacia lingvo.

PODĚBRADY. La 17.12. okazis en informejo de ĉsl. banejoj /stacidomo Poděbrady/ solena vespero omaĝe al la 120.datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof,pri kiu parolis J. Skramuský. ĈEA-informojn aktualigis P.Polnický kaj nova membrino M.Strumínská transprenis zorgon pri propagandkesteto en la urbo. Skr.

TÁBOR. EK aranĝis la 10.12. rememoran vesperon okaze de la naskiĝa datreveno de D-ro Zamenhof kun jena programo: ekspozicio de E-libroj kaj gazetoj, inaŭguro, rememoro pri LLZ, kultura programero, kantado.
En Táborský zpravodaj aperis ampleksa artikolo pri Esperanto kaj informo pri "Rememorvespero"okaze de datreveno de naskiĝtago de LLZ.Samtempe la E-vivo viglas.

ÚSTÍ n.Lab. La 21-an de dec. 1979 okazigis Esp.rondeto ĉe la Domo de Kulturo /ODKP/ en la urbo vesperon omaĝe al la 120-a datreveno de l'naskiĝo de d-ro L.L.Zamenhof.La prezidanto de la rondeto, doc. d-ro Vl.Novobilský,CSc. skizis la vivon kaj verkon de la aŭtoro de Esperanto.En la sekvinta kultura programo kantis gesolistoj de la Ŝtata Operteatro en Ústí n. L., Mir.Smyčka kaj J. Scholzeová en esp.tradukoj plurajn famajn operariojn kaj duetojn kaj klasikajn kantojn. JK

PLZEŇ. Okaze de la 30 - jara ekzisto de Uzina Klubo ŠKODA Plzeň, ricevis Esp. rondeto Oran medalon kun Diplomo pro sia sukcesplena en- kaj eksterlanda agado.

OSTROV.Esp.rondeto dum sia kunveno la 9.12.preparis la agadplanon por 1980 kaj decidis proponi al diversaj EK interkluban korespondadon.La rondeto kunvenados de nun la duan dimanĉon ĉiumonate de 9,30 - 12 en Domo de kulturo. Okaze de la naskiĝjubileo de Dro Zamenhof estis aranĝita plaĉa koncerto.

ZNOJMO. EK aranĝis la 20.12. solenan vesperon omaĝe al la jubileo de Zamenhof.Programo konsistis el parolado,deklamado,kantoj kaj ekspozicio de libroj kaj gazetoj. Ankaŭ estis prezentitaj koloraj lumbildoj pri la 64-a UK en Lucerno. Granda partopreno de la samideanaro kaj gastoj.

Du niaj lokaj grupoj:unu el Plzeň, la dua el Česká Třebová ĉi-jare festas siajn jubileojn-Plzeň la 75-an kaj Česká Třebová la 20-an.Ambaŭ sendis interesajn artikolojn pri la historio de la loka movado kaj laboro.Bedaŭrinde loko mankas, ni publikigos ilin alifoje. Tamen ni ĉiuj gratulas al tiu senĉesa laboro kaj deziras ankoraŭ en meritplena agado por nia movado multajn sukcesojn!



# KRONIKO

La 16-an de novembro 1979 en sia 73-a vivojaro forpasis longjara vicprezidanto de LG de ĈEA kaj MEM-peranto s-ano Robert L i p k a. Honoro al lia memoro!

Membro de LG Příbram Josef H o ř e j š í festos baldaŭ sian 50-jariĝon. Ni deziras al li daŭran sanon kaj plujn almenaŭ 30 jarojn de fervora laboro por nia komuna celo - tutmonda interkompreniĝo.

La 9.1.1980 fariĝis 65- jara Julie Bouchalová kaj la 11.1. ĝisvivis en plena vigleco 80 jarojn s-ano Josef Hering, esperantisto de 1920 kaj bona kolektanto de uzitaj materialoj por konkursoj.Ambaŭ membroj de ER en Plzeň. Sincerajn bondezirojn!

Nova edziĝo.

Ni gratulas al inĝ. Margita S t r n a d o v á,membrino de nia Centrala Komitato edziĝis 29-a de decembro 1979 j. kun inĝ.Jiří Turek. Ni gratulas kaj deziras multe da feliĉo.

Eva Seemenová,konata nia aktorino festis antaŭnelonge la datrevenon de sia naskiĝo. Ne,ne ĉe virinoj oni ne publikas aĝon.Nur gratulojn, multe da sano kaj pluajn sukcesojn en sia poresperanta laboro.

## KORESPONDI DEZIRAS ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk.Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

"Starto" n-rojn 1 kaj 2/1969 kaj 1/1971 mi aĉetos por ĉiu prezo, ĉiujn elspezojn mi pagos. Vláda HASALA, 691- 42 V a l t i c e ,distr.Břeclav

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco ni aranĝas letervesperon. Ni petas,sendu salutojn kaj koresponddezirojn al Kulturbund der DDR KAG Esperanto,DDR-27SCHWERIN Wilhelm-Pieck-Str.8.Respondo certa.

Pola geedza paro proponas libertempan interŝanĝon de moderna loĝejo en Bydgoszcz je sama en ĈSSR. Interesuloj kontaktiĝu kun M.i J.Ponitowscy, 85 - 822 BYDGOSZCZ ul.J.Krasickiego 19/50 Polio

Mi deziras interŝanĝi bildkartojn pri folkloraj kostumoj el la tuta mondo.Ĉiam mi respondos.Adreso: Vladimír R o t r e k l, Dobšice 297, 669 02 Z N O J M O

Mi interesas korespondi kun teknikistoj,teknologoj,konstrukciistoj el ĈSSR.Skribu al W.Hofmenn,Kopernikustrasse 60, 9030 Karl-Marx-Stadt

## INFORMOJ DE SEKRETARIO

ESPERANTISTÉ V BOJI PROTI FAŠISMU

v ý z v a ke všem členům Č E S

Mírová sekce ČES si vytýčila úkol sbírat materiály o esperantistech, kteří bojovali proti fašismu. Řada esperantistů byla za tuto činnost během fašistické okupace persekvována. Někteří bojovali již dříve v občanské válce ve Španělsku , mnozí ztratili svůj život. Žádáme pamětníky,aby nám napsali. Velmi by pomohly fotografie, dopisy, časopisy, zápisy ze schůzí a jiné doklady z tohoto období. Zapůjčené dokumenty vrátíme.

U příležitosti 35. výročí osvobození chceme na všechny vzpomenout.

Prosíme všechny kroužky ČES, aby naši výzvu publikovaly ve svých oběžnících a periodikách.

●

U P O Z O R Ň U J E M E , že v poslední době se vyskytly případy, že někteří mladí esperantisté vystupovali jako zástupci komise mládeže a byli tak i přijímáni, i když je komise ničím nepověřila. Tím došlo k nedorozuměním a přehmatům. Zřejmě vládne mylná představa, že do komise patří každý mladý esperantista. Ve skutečnosti je komise pro práci s mládeží Českého esperantského svazu orgán vytvořený svazem a je s e d m i členný.Kromě těchto 7 členů nemá nikdo právo jménem komise vystupovat, leda že by k tomu měl písemné pověření. Znovu proto uvádíme, že členové komise pro práci s mládeží ČES jsou:

1. Olga Sittauerová, Znojemská 1128 674 01 Třebíč..předseda
2. Dr.Vladimír Škoda,Leninova 464 664 51 Šlapanice u Brna... jednatel
3. Petr Deák, Máchova 4 415 01 Teplice v Čechách.......člen
4. Miroslav Malovec, Slovákova 9 602 00 Brno..........člen
5. Jaroslav Smetáček,Řehořova 1018-36 130 00 Praha 3....člen
6. Václav Vítek, Přemyšlenská 13 182 00 Praha 8........člen
7. Jiří Vyšinka, Kollárova 131 696 42 Vracov .........člen

●

ĈU KONKURSO SUKCESIS ?

Komence de la jaro 1979 proklamis la Metodika-propaganda Komisiono de ĈEA la Konkurson de propagandaj kestoj okaze de la Internacia Jaro de Infano. La ĵurio jam pritaksis la aliĝintojn kaj atribuis ankaŭ premiojn. En la konkurso venkis EK Interklubo Pardubice-Studánka. En la verdikto de la ĵurio oni konstatas, ke en la konkursaĵoj troviĝis gravaj eraroj speciale el aranĝotekniko de propagandaj montrokestoj. Ne ĉagrenas nin tiuj mankoj, sed la konkurson partoprenis n u r k v a r grupoj de ĈEA. Tiu fakto atestas, ke la propaganda laboro en niaj grupoj estas grave subtaksata kaj oni al ĝi dediĉas nesufiĉan atentemon. Ĉu vere nia movado estas en tia bonstato, ke ĝi ne bezonas efikan propagandon?

vlk






Plej bone arangita propaganda kesto de LG Pardubice.

"RIPORTO SKRIBITA EN PENDUMILA MAŜO"-noveldonita libro fare de ĈEA jam estas en nia asocio. Vi povas tuj mendi tiun ĉi novaĵon. Prezo Kčs 25,-. Kiu abonis PAĈOn 1980 ĉe nia asocio kaj pagis la abonon Kčs 16,- ricevis aŭtomate rabaton. Fremdlandaj interesuloj povas ricevi la libron por 13 irpk aŭ 10 gld /inkluzive sendokostoj/.

●

NOVA ELDONO DE ÄRZTLICHER DOLMETSCHER EN GDR

La konata ŝtata eldonejo por medicina literaturo Verlag Johann Ambrosius Barth /DDR-701-LEIPZIG, Postfach 109 Salomon -str.18/ eldonis en la jaro 1977 tre interesan libron "Ärztlicher Dolmetscher" de Gert Hoyer/Ute Hoyer. "Kuracista interpretisto estas 262-paĝa, 14 lingva interpreta helpilo por konversacio inter kuracisto kaj paciento en kazo de neceso eksterlande. La libro entenas 271 tipajn frazojn, kiujn starigas la kuracisto al la paciento, kiu nur devas respondi alternative /jes aŭ ne/. La libro entenas jenajn lingvojn: germana,rusa,angla,franca,bulgara,pola,rumana,ĉeĥa, hungara, araba,itala,sveda,hispana kaj Esperanto.
La libro ricevis bonajn recenzojn en la Esperanto-gazetaro . Kiel tuj videblas, ĝi estas tre larĝe utiligebla kaj prezentas por esperantistoj vere grandan valoron.

1980 aperos dua eldono, kiu havas plastan kovrilon. Se vi havas intereson pri la titolo,bv.sendi vian antaŭmendon rekte al la eldonejo laŭ la supra adreso.

UNUAFOJE EN LA HISTORIO DE ESP. MOVADO. ĈEA eldonis diversajn esp.simbolojn sur PROPISOT-sistemo. Sur formato A4 estas 50 diversaj simboloj en ora kaj verda koloroj. La aŭtoro de simboloj estas Jaroslav Klement. Prezo: Kčs 27,- aŭ 11 irpk - por eksterlandano jam kun sendokosto.

●

VIRINA KOMISIONO DE PORPACA SEKCIO FONDITA

La 8-an de decembro 1979 efektiviĝis fondkunveno de la Virina komisiono de porpaca sekcio /pli frue MEM-sekcio/.

Dum la fondkunveno estis elektita jena komitato:Marie Turková-prezidanto, Alena Klementová-vicprezidanto,Marie Struminská-sekretariino, Otylie Barešová kaj Ludmila Benáková - komitatanoj.

Ni vokas ĉiujn virinojn-esperantistinojn al la komuna agado. Bv.sendi vian kontribuon pri la agado ekz.en:Esperanto, zorgo pri eduko de la infanoj, kunlaboro kun landaj Asocioj de la Virinoj, Paca Konsilantaro, zorgo pri maljunuloj ktp. Interŝanĝu viajn opiniojn sur la paĝoj de nia nova gazeto "Vivo de la Virinoj". La gazeto havos vastan enhavon eĉ pri diversaj ŝat-okupoj, poemojn, historiojn de diversaj gentoj kaj iliajn kutimojn kaj morojn, manlaborojn /trikadon, brodadon, diversteknikajn priskribojn de la modeloj/,kuiradon ktp. La kontribuoj estos tre bonvenaj eĉ de la viroj. Sendu ilin al la adreso de la prezidantino de VK Marie Turková , Vrchlického str.n-ro 7 , 320 29 P l z e ň .

●

Metodika-propaganda komisiono de ĈEA rekomendas...
Multaj dubaj kaj dubindaj opinioj pri konzervativeco de nia komuna propaganda laboro kaj pri nia uzado de simboliko aperintaj komence de oktobro 1979 en Mělník verŝajne malaperos, se vi ĉiuj tralegos /kaj detale trastudos!/ gravan artikolon "Pri la interna ideo de Esperanto" verkitan de D-ro D.Blanke kaj publikigitan en la lasta eldono de PACO el GDR/pĝ.28-35/. Same nia komisiono preparis gravan materialon pri la simboliko en Esperanto-movado /kun koncerna eltiraĵo el la "Regularo de Frostavallen 1956"/ kaj kun multaj ilustraĵoj akompanantaj riĉan historian kaj politikan dokumentaron de tiu ĉi grava temo.

●

ĈU VI VOLAS VETURI KUN NI AL LA 65a UK EN STOKHOLMO?
Kiel lastjare ankaŭ nun ni preparas kun ĉs. vojaĝagentejo ČEDOK karavanon de niaj membroj por la 65a UK en Stokholmo. Ni intencas forflugi el Praha 1.8.kaj reveni 10.8.1980.Nombro pro devizaj kaŭzoj estas limigita. Ni rekomendas tuj aliĝi al nia asocio. Antaŭvidata prezo 9 - 10 mil kronoj.En ĝi estas enkalkulita krom flugbiletoj ankaŭ loĝo,manĝo,poŝmono kaj kongreskotizo. Kiu do ne sukcesis veturi private havas ankoraŭ eblecon.

●

DUM NOVEMBRA KUNVENO DE LA CENTRA KOMITATO DE Ĉ E A estis pritraktitaj kelkaj gravaj punktoj de la programo:
- agadplano kaj buĝeto por la jaro 1980,
- voĉdonado por nova statuto de U E A ,
- plenumado de la agadplano 1979 ,
- situacio en Somera Esperanto-Tendaro Lančov,
- agado de Kontrola komisiono,
- regularo por agado de Lokaj grupoj kaj ekonomia regularo de Ĉ E A.

Post riĉa diskuto estis akceptitaj proponitaj dokumentoj kun kelkaj aldonoj. Ĉiuj Lokaj grupoj ricevis asocian agadplanon por 1980, same ankaŭ la regularon. Ne estas bezone ilin ĉi tie denove ripeti.

Oni povas konstati, ke la asocio dum estinta jaro startis novan vojon, vojon de vere rigoroze preparitaj dokumentoj, kiuj montras diversajn eblecojn de la asocio kaj povas helpi pli bone orientiĝi.

●

KOMENCE DE NOVEMBRO en K R A K O V O N veturis deĵore unua asocia vicprezidanto inĝ.Vlastimil Kočvara kaj la sekretario Zdenko Křimský por trakti kun Pola Esp-Asocio okaze de kultura aranĝo "OPERA". Certe ne temis pri ekskurso, sed pri pena laboro. Estis elektitaj eventualaj ensembloj por nia Kultura festivalo en Opava, pritraktitaj kondiĉoj por subskribo de INTERKONSENTO pri kunlaboro inter ĈEA kaj PEA, sonditaj novaj eblecoj de kunlaboro kun Finna Esp. Asocio



1



2

1. El akcepto de eksterlandaj reprezentantoj en unu el belaj krakovaj kafejoj

2. infana folklora grupo prezentas programon

kaj oni havis eblecon ankaŭ iomete prepari kaj pritrakti starigon de la Federacio de ĉeĥa kaj slovaka esp.asocioj.

Tamen estas necese diri, ke ni enviis al niaj polaj kole - goj la sukceson kolekti por ilia kultura aranĝo O P E R A, tiom da diversspecaj grupoj de esperantistoj, kiuj prezentis sian intereson labori en kultura sfero. Certe, ne ĉiuj grupoj estis samnivelaj, saminteresaj, sed estis vera amaso, el kiu oni jam povas elekti.

Denove brilis perfekta organiza kapablo de Ewa Kuligowska, sekretariino de PEA, kiu ĉiam kun ĉarmo kaj trankvileco venkis oftajn problemojn, kiujn alportas similaj aranĝoj. Vere niaj membroj, kiuj ĝis nun ne malkovris avantaĝojn de ekskursoj en Pollandon povas bedaŭri.

●

LA NORDBOHEMIA RADIO, sendilo Ústí nad Labem la 6an de dec. 1979 dissendis 20-minutan intervjuon kun elstaraj estraranoj de la Esp.rondeto ĉe ODKP /Sindikata domo de kulturo de laboruloj/ en Ústí n.Lab. Prezidanto de la rondeto doc.d-ro V. Novobilský,CSc. skizis en tre temelĉerpa kaj informiva parto atingaĵojn kaj perspektivojn de Esperanto en ĉiuj sferoj de homa agado, precipe scienco. La vicprezidanto s-ano Jiří Kořínek en la respondoj al la intervjuanta redaktoro Horák diris laŭeble multon pri sia literatura laboro,poezitradukoj kaj originaloj, pri ebleco de disvastiĝo de ĉeĥa kaj slovaka literaturoj tra la mondo pere de Esperanto.

La elsendo estis vere bonefika. Ĝi okazis posttagmeze post la 15a horo sur la mezondo 864 kc.

---

Vi povas partopreni pere de ĈEA

INTERNACIAJn ESPERANTO-ARANĜOJn en POLLANDO en 1980

Prezoj indikitaj en Kčs

1-EPS - 1 - 15.03. - SZCZYRK apud Bielsko Biała
Esperanto-Feriado en Beskidy-montaro
OK: Filio de PEA en Katowice, str.Wolności 37
PL - 41 - 500 C H O R Z Ó W 1590,-

2-EPB -28.05-1.06 - BYDGOSZCZ
V-a Internacia Esperanto-Renkonto "BYDGOSZCZ-80"okaze de TAGOJ DE BYDGOSZCZ kun Internacia konkurso de Esperanto-kantoj kaj Internacia trarigardo de folklorensembloj de Etnografia muzeo Toruń
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str.M.Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ 490,-

3-EPM - 1 - 8.06 - Ustronie Morskie apud KOSZALIN
V-a Ĉebalta Esperanto-Printempo kun seminario por tradukistoj
OK: Filio de PEA en Koszalin,poŝtkesto 30, PL-75- 950 KOSZALIN 1190,-

4-EPF -19.07-1.08 Internacia Infana Esp.Vilaĝo en FUNKA ĉe Chojnice.Eblas komuna vojaĝo de infanoj:Varsovio-Toruń-Bydgoszcz-Funka-Gdańsk dum la 19.07.-1.08.80--aldonaj prezoj Kčs 490,- 1240,-
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz,str.M.Skłodowskiej - Curie 10, PL - 85 - 094 BYDGOSZCZ

5-EPG -27.07 - 1.08 - G D A Ń S K - A N T A Ŭ K O N G R E S O de UEA. OK: Filio de PEA en Gdańsk, str.Legnicka 2/1, PL 80 - 200 Gdańsk 990,-

6-EPB -25.07 - 1.08 - BYDGOSZCZ - KONGRESO de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str.M.Skłodowskiej-Curie 10, PL 85 - 094 BYDGOSZCZ 990,-

7-EPM -16.06 - 27.06 - MIEDZIZDROJE-ŚWINOUJSCIE-VIIa Internacia Esperanto-feriado ĉe Balta Maro
OK: Filio de PEA en Szczecin, "Gromada",Pl.Lotników 7, SZCZECIN 2290,-

8-EPM -31.08-14.09 - MIEDZYGÓRZE - XVIa Internacia Esperanto-Feriado "ORA POLA AŬTUNO"
OK: Filio de PEA en Wrocław,str.Dubois 3, PL - 50- 952 WROCŁAW 1490,-

9-EPW -12.08 - 26.08 - WLADYSŁAWOWO apud Gdańsk ĉe Balta Maro Somera Esperanto-Lernejo
OK: Filio de PEA Bydgoszcz,str.M.Skłodowskiej-Curie 10 PL 85-094 BYDGOSZCZ 1590,-

10-EPB-8.-13.11.-VIa Internacia Foiro de Esperanto-Turismo Warszawa-Bydgoszcz-Gdańsk-Toruń-Warszawa
OK: Filio de PEA Bydgoszcz,str.M.Skłodowskiej-Curie 10 PL 85-094 BYDGOSZCZ 1190,-

●

INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ EN POLLANDO

LAŬ LA PROGRAMO DE UEA

Varsovio-Bydgoszcz-Varsovio kun ekskursoj al Toruń kaj Gdańsk

31-EPB - 20.01-27.01 35-EPB- 8-15.06 38 EPB - 29.06-6.07
32-EPB - 27.01- 3.02 36-EPB-15-22.06 39 EPB - 6.07-13.07
33-EPB - 3.02-10.02 37-EPB-22-29.06 40 EPB - 13.07-20.07
34-EPB - 10.02-17.02

La prezo de ĉiuj semajnaj restadoj kun 24-hora Esperanto - kurso laŭ la programo aprobita de UEA kaj kun kulturturisma programo estas Kčs 990,- Eblas ankaŭ aldone mendi 10 horojn de ĉevalrajdado, kiu kostas Kčs 595,-. Ĉiujn kursojn aranĝas Filio de PEA BYDGOSZCZ,str.M.Skłodowskiej-Curie 10,PL 85-094 BYDGOSZCZ, Pollando. Partoprenu kaj pagu pere de ĈEA !

---

BAZA INFORMARO PRI SEMINARIO DE APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO 1980

Organizanto: Scienc-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Adreso de SAEST-sekretario: Jiří Patera, Na usedlosti 1534
CS-140 00 Praha 4 - Krč
Loko: Ú s t í nad Labem /nordbohemia regiona urbo/
Dato: 29 - 31a de aŭgusto 1980

Partopren-kotizo: 50 Kčs /inkluzivas kolekton de referaĵoj/
Tranoktado: en 2-litaj ĉambroj de Studenta hejmo

Temoj: I.a/ Terminologiaj principoj
b/ Traduko de faka teksto kiel scienca branĉo

II. Kontribuo kaj sinteno de unuopaj sciencaj kaj teĥnikaj fakoj al la vivmedio /pozitiva, negativa, perspektivoj/.

●

SOMERAN ESPERANTISTAN FAMILIAN TENDARON vi povas partopreni dum la 23-a ĝis 30-a de aŭgusto 1980 en tendaro THOMSDORF, en arbaroj kaj lagoriĉa regiono.
Pluajn informojn petu ĉe nia turisma komisiono s-anoJ.V.OTTA aŭ rekte ĉe s-ano Werner Pfennig, GDR 2000 NEŬBRANDENBURG, Leibnitzstr. 5/67. Propono validas ĝis fino de m a j o .

●

POSTKONGRESO EN OSLO 1980. Norvega Esperantista Ligo invitas al postkongreso en la bela norvega ĉefurbo dum la tagoj 10a - 12a de aŭgusto 1980.
La ampleksa programo de la 3-taga restado en Oslo rakontas pri allogaj ekskursoj al la vidindaĵoj de Oslo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ekz.vizitoj de la Urbodomo, la Folklora Muzeo, la Vikingaj ŝipoj, la polusesplora ŝipo "Fram", la flosoj"Kon-Tiki" kaj "Ra"/kiujn uzis Thor Heyerdahl en siaj ekspedicioj/,al la fama skisaltejo Holmenkollen kun grandioza panoramo, ŝipekskurso sur la bela Oslo-fjordo kaj al la muzeo de la mondkonata pentristo Edv. Munch.
Cetere okazos Distra Vespero kaj renkontiĝo kun norvegaj esperantistoj ĉe festena tablo. Kongreskotizo: norv. kr. 100,- Prezoj por hotelo, ĉiuj manĝoj kaj ĉiuj ekskursoj sumiĝas je nur norv.kr.800,-/rabato por infanoj ĝis 15-jaraj kaj por blinduloj/.
Limdato por aliĝo: la 1-an de julio 1980; sed ĉar la lokoj estas limigitaj, estas rekomendinde aliĝi laŭeble baldaŭ.Aliĝiloj riceveblaj de: Postkongreso en Oslo, Boks 942 O S L O 1, Norvegujo /kun kompleta programo/.


●

Ĉ E A : la prezidanto kaj la sekretario dankas al ĉiu unuopulo, lokaj grupoj, eksterlandaj geesperantistoj kaj asocioj por kristnaskaj kaj novjaraj salutoj kaj bondeziroj,kiujn ili sincere reciprokas.

---

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU Jilská lo, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá Dr.Jaromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Labašta /příloha Jaroslav Klement/. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven.Předáno do tisku 25.ledna 198o. Dohledací pošta Praha o7, snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvím pošt Praha, pod čj. zn. P/l - 1267/79 ze dne 6. dubna 1979.





HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

BALNEA

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU
o o o o o o o o o o o

BALNEA
PRAHA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1
ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215

# Československé štátne kúpele

## BARDĚJOVSKÉ KÚPELE

Ek de la jaro 1247 en la banloko BARDĚJOV estas kuracataj:

- ulkusa malsano de stomako kaj duodeno
- malsanoj de hepato
- malsanoj de pankreato
- malsanoj de intestaro
- diabeto
- tiel nomataj civilizaciaj malsanoj

VIZITU NIN KAJ PETU PLIPROKSIMAJN INFORMOJN:
BARDĚJOVSKÉ KÚPELE
08631 BARDĚJOV, ĈSSR, telefonnumero: 2717, 2824, 3591,
TELEX 076294

## ĈEĤOSLOVAKAJ ŜTATAJ BANEJOJ EN BARDĚJOV